

Anarkismo

JAPANA CENTRO POR ESPLORO DE ANARKISMO

ĉe RYU-Buiĉirō
Sugita 251, FUZINOMIYA,
Shizuoka, Japanio.

n-ro 4

Aŭgusto 1974

...ENHAVO...

Esploras la eblecon de regiona komuna sindikato	
...Stud-grupo de nord-okcidenta regiono	2
Por starigi sav- k help-sistemon...Nigra Kruco en Tokio	10
Kun infanoj—al mia frato—	...KOBORI-Emiko 15
Anarkista movado sub milita leĝo en Sud-Koreio..OZEKI-H	18
Biografio de unu koreo-anarkisto(2)—Fundamenta plano por sendependiga movado de Koreio en Manĉulio...Li-Eulgyu	24
<<La Tajdo>> marto-aprilo-majo	31
•Notoj de la movado..Organoj..Gazet-Artikoloj..Libroj..	
•Recenzo IŜIKAWA-Sanŝirō"Historio de socialismaj movadoj en okcidento"	
<<Opinioj>>	35
•Notoj pri edukado	...KITAGAWA-Kitarō
•EGUĈI-Kan"Noto—Politika situacio en Japanio"	...Red.
•Pri Mondlingvo Esperanto	...ETO'-T.
•"Sekso k Anarkismo" k pluvnokto k steloj...NAKAMURA-R.	
<Anarkistaj grupoj en eksterlandoj>(3)	43
•Pasinto k nuntempo de "Freedom"	...HAŜIMOTO-Joŝiharu
•Al la revoluciaj anarkistoj en Japanio	
...Ken-Nobu(trad.KOMIZO-H.)	
•Vojaĝo en mez- k sud-ameriko—Venezuelo-Argentino-Ĉilio	...JAMAMOTO-A.
Kronologia tabelo de anarkisma movado en Japanio post la mondmilito (1956-1960)	52
Ama kanto malnovstila—pri anarkismo—	
...Paul Goodman (trad.KATAGIRI-J.)	62
Postskribo	...Red. 68

ESPLORAS LA EBLECON DE REGIONA KOMUNA SINDIKATO

Post la mondmilito sindikatoj en Japanio estis organizitaj en la kadro de respektivaj entreprenoj, k tiel formis la federacion laŭ industri-specoj, kies unuo estas sindikato laŭ entrepreno. Tia strukturo k fluo de la sindikata movado dum 30 jaroj depost la milito garantiis en la alta progreso de japana ekonomio certan gajnaĵon al la laboristaro.

Sed tia sindikata movado estas farata ĉefe de la sindikatoj en grandskalaj entreprenoj, k ignoras pli ol 60 procentojn de la tuta laboristaro, t.e. laboristoj en malgrandaj entreprenoj, k provizoraj laboristoj kiuj formas konstante sufiĉe dikan tavolon de laboristoj sub la nomo de mallongperioda laboro.

Nun aperas diversaj kritikoj kontraŭ ĝisnunaj sindikat-movadoj ĉefe de grandaj entreprenoj. Jen surbaze de la kritikoj estas la aserto de "regiona komuna sindikato" fare de ni anarkistoj, kies programo estas nun en diskutado. Ĝi celas kolekti en unu sindikaton ĉiujn laboristojn laborantajn en unu regiono sen diferencigo laŭ grandeco de entreprenoj aŭ laŭ dungmanieroj, k plie formi federacion de la regionaj sindikatoj. Oni prikonsideras ke ĝi ankaŭ pritraktu vivkondiĉojn de la regiono krom laborkondiĉojn.

Pri tiu regiona komuna sindikato ni havas la sperton de k-do FUKUDA, kiu dum 20 jaroj faris la movadon en la urbo FUĴI (urbo de papero-fabrikado fama je KŌGAI aŭ poluado). Nia unua tasko por tiu ĉi problemo do estas utiligi k progresigi la sperton de k-do FUKUDA. Tiu ĉi artikolo estas ĝia skizo.

ANARKISTA MOVADO SUB MILITA LEĜO EN SUDA KOREIO

Anarkista movado de koreoj estas ĝis nun ne bone konata. La movado naskiĝis ĉ. la jaro 1920a dum la kolonia regado de Japanio, prenis sur sin gravan parton de la naci-liberiga batalo, k disvolviĝis en pluraj lokoj en Japanio aŭ en Ĉinio. Sed post la dividiĝo en nordon k sudon sub ^mkoplikita politika situacio la anarkista movado ŝajnis malaperinta. Tie certe kuŝis diversaj problemoj, ekz. interpuŝiĝo kun la naciismo k.a.

Tiu ĉi raporto de k-do OZEKI, kiu vizitis malnovajn anarkistojn en Suda Koreio, informas al ni nunan staton de anarkistoj, kiuj daŭrigas sian agadon eĉ sub la militista subpremo.

JAPANA CENTRO POR ESPLORO DE ANARKISMO, kies fondiĝon oni alvokis jam antaŭ tri jaroj, estas nun en konstruado kun helpoj k subtenoj de multaj kamaradoj.

La CELO de la centro estas "kolekti k aranĝi dokumentojn, materialojn, organojn antaŭajn k nunajn de la ideoj k movadoj kontraŭpotencaj, kontraŭŝtataj, liberecanaj, perfekte konservi k vaste prezenti ilin por dezirantoj". Tiucele en 1971 bonvoluloj komencis labori k tiusomere finkonstruis la bibliotekon. Poste ili daŭre laboras precipe por kolekti k aranĝi librojn k materialojn.

国レポート——衛戍令下の韓国アナキズム運動——は、彼独特の対話形式を用いて、ア

頁数の制限がかなりきつくなってきた。三